

Pri la svisa neŭtraleco, IV
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 januaro 16 kaj 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Dum tri elsendoj, kiujn ni jam dediĉis al la naskiĝo kaj disvolviĝo de la svisa neŭtraleco, ni montris, ke nur iom post iom naskiĝis tiu nocio. Unue eĉ mankis vorto por ĝin difini.

A.- Por esprimi la koncepton neŭtraleco la svisoj unue uzis en siaj debatoj kaj skribaĵoj la germanan esprimon "stille sitzen", kio tradukeblas per "trankvile sidi" kaj fakte signifas "sindeteni". Tiun esprimon oni trovas por la unua fojo en la jaro 1399-a en pakto subskribita de la civitoj Bern kaj Solothurn kun margrafo Rudolf von Hochberg, princo de Neuchâtel. Tiu dokumento estas konservita en la arkivejo de la Berna Ŝtato. Jen resume en tiama germana dialekta lingvaĵo la frazo, en kiu troviĝas por la unua fojo la esprimo "stille sitzen"

Cl.- "Were och... das den egeschriben herren den margrafen... dehein krieg ankeme, mit weme das were... denne sollen wir... von Berne und von Solottern... stille sitzen."

A.- La subskribintoj de la koncerna pakto de 1399 promesis trankvile sidi, do sin deteni, okaze de militkonflikto, kiu povus ankaŭ ilin koncerni. La neologismo neŭtraleco, "neutralitet" estis forĝita en la dekseca jarcento el la latina adjektivo "neutral". Ĝi ekaperas unuafoje en la jaro 1536-a en politika "ordono" de la ŝtato Zürich. Ni citu la germanlingvan esprimon:

Cl.- "unpartyschung und neutralitet"

A.- "senpartiecon kaj neŭtralecon" ordonas tiu zurika dokumento.

Cl.- La civitanoj kaj la gvidantoj de la 13 ŝtatoj, kiuj formis la Svisan Ligon, malkovris, kiel ni montris en niaj pasintaj elsendoj, ke paca kunvivado inter iliaj civitoj povas reale harmonie disvolviĝi, nur se ĉiu ŝtato rezignas je interveno en la aferojn de la 12 aliaj membro-ŝtatoj de la ligo. La neŭtraleco aŭ politika sindeteno rilate al la civitana vivo interna al la 12 aliaj ŝtatoj montriĝas pli kaj pli kvazaŭ la "oleo", kiu ebligas la funkciadon de la kompleksa federacia aparato. Neniu ŝtato rajtas rekte interveni en la vivon de la ceteraj ŝtatoj. Ĉiujn problemojn oni devas debati en kunsidoj de la asembleo de la ambasadoroj de la 13 ŝtatoj kaj de ties amikaj ŝtatoj kaj poste solvi per arbitracio. La ambasadora asembleo nomiĝis Dieto.

A.- Tiu Dieto deklaris unuafoje en la jaro 1674-a, ke la principo de neŭtraleco karakterizas ankaŭ la eksteran politikon de la Svisa Ligo. Ĵus eksplodis milito en Eŭropo, kaj en proklamo sendita al ĉiuj najbaraj registaroj, la Svisa Komunumo konigis, ke ĝi restos absolute neŭtrala kaj sin ligos, nek unuflanke, nek aliflanke, en la ĵus eksplodinta konflikto. La originala protokolo de tiu grava decido konserviĝis en la Bazela Arkivejo. Ni citu la historian frazon, kiu entenas la formulon "Neutral Standt", kio signifas "neŭtrala pozicio":

Cl.- "...sonderlich, dass wir uns als ein Neutral Standt halten und wohl versorgen wollen und sollen, dass wir uns Keinstheils soweit einmischen, dadurch wir uns auch in den Krieg einwickhlen könnnten..."

A.- Ekde tiam fariĝis kutimo sendi tiajn avertojn pri la svisa neŭtraleco, kiam armitaj konfliktoj minacis naskiĝi. La Svisa Komunumo daŭre ripetis per plej diversaj formuloj, ke ĝi havas la volon kaj la devon stari neŭtrale kontraŭ ĉia armita konflikto.

Cl.- La milita neŭtraleco de Svislando rezultis ekde sia komenco de la denaska nekapablo de la ligoj havi komunan eksteran politikon. Ĉiu federaciiginta civito ĵaluze konservis la propran suverenecon. Tamen la gvidantoj de tiu ligo de 13 aŭtonomaj ŝtatoj komprenis, ke la principo de politika sindeteno aŭ neŭtraleco, kiu estas vivnecesa interne de la federacio mem, ankaŭ estas eksterpolitika neceso.

A.- Militaj malvenkoj en Lombardio komprenigis, ke komuna ekstera politiko devigus al kreo de superŝtataj institucioj: do de komunaj registaro kaj armeo kaj tre verŝajne de komuna mono. Tion ili ne volis. Ili preferis konservi sian plenan individuecon kaj rezigni je komuna ekstera politiko.

Cl.- Sed la soldata vivo estis unu el la ĉefaj okupoj de la plimulto de la laborkapablaj svisoj. Rezigni je militaj konkeroj ne signifis rezigni je la soldata metio. Kreiĝis armeoj je la servo de aliaj landoj, kaj ĝuste la proklamita neŭtraleco okaze de militaj konfliktoj donis la eblon havi dungarmeojn je la servo de ĉiuj ŝtatoj. La nura kondiĉo estis, ke okaze de konflikto la svisaj dungsoldatoj je la servo de la konfliktantaj potencoj ne renkontiĝu sur la batal-kampoj. Tiaj renkontiĝoj kondukis al rifuzo batali kaj al rompo de la dungarmeaj konvencioj.

A.- Dungsoldateco okupis pli ol la duonon de la svisaj viroj. La loĝantaro de la 13-ŝtata svisa ligo ne atingis du milionojn da homoj kaj proksimume 400'000 dungsoldatoj deĵoris serve al la diversaj reĝlandoj. Do dudek procentoj de la loĝantaro laboris eksterlande kiel dungsoldatoj je la servo de reĝoj, princoj, kardinaloj kaj eĉ de la papo.

Cl.- La ambasadoroj de la svisaj ŝtatoj lertis en la marĉandado de la rentoj, kiujn la registaroj ŝuldis por havi dungarmeon je dispono. Kaj tio alportis riĉecon al la svisaj ŝtatoj kaj solvis la problemon de la senlaboreco. Kiam soldato revenis kripla aŭ pro maljuneco, li ricevis etan renton, kiu kovris liajn vivelspezojn en la propra familio. Tial oni konsideris la dungsoldatecon kiel sufiĉe sekuran profesion, eĉ se en la protestantaj ŝtatoj, tiu metio estis pli kaj pli kritikata. Cetere tiuj kritikoj favoris la industriiigon de la protestantaj ŝtatoj. La junuloj preferis ne fariĝi dungsoldatoj.

A.- La federacia konstitucio de 1848 malpermesis la dungsoldatecon. Tio donis laborfortojn profite al industriaj kaj turismaj aktivecoj. La junaj viroj devis trovi alian profesion, ol la soldatan. Escepto restis profite al la defendo de la papo. Vizitante Vatikanon oni rimarkas, ke la soldatoj parolas la svisgermanan lingvon kaj venas el la centra Svislando katolika.

Cl.- Unu el la kaŭzoj de la kritikoj, kontraŭ la svisa neŭtraleco, tutcerte fontas el la periodo de la dungsoldateco. Ĉiu reĝo riproĉis, ke svisoj ankaŭ deĵoras je la servo de la malamikaj landoj. Kaj oni diris, ke la svisoj riĉiĝas pere de alies militoj. Eĉ post la malpermeso de la dungsoldateco tamen plurpetiĝis tiu kritiko.

A.- Tiu kritiko plue kaj alimaniere nutriĝis de nova maniero interpreti la neŭtralecon fare de la federacia registaro. Kiam milito eksplodas, la svisa federacia registaro konsideras, ke la neŭtraleco devigas Svislandon konservi senŝanĝe la proporciojn de la internaciaj interŝanĝoj.

Ĝi kondiĉigas la aĉetemon aŭ vendemon fare de batalanto, ke ankaŭ la aliaj batalantoj konservu la rajton aĉeti kaj vendi laŭ la proporcioj, kiuj ekzistis antaŭ la konflikto.

Cl.- Estus manko kontraŭ la neŭtraleco, se dum la koncerna konflikto la interŝanĝproporcioj ŝanĝiĝus. La batalantoj respektis tiun svisan manieron koncepti la neŭtralecon. Se ili mem volis daŭrigi la komercajn interŝanĝojn, ili devis akcepti, ke ankaŭ la malamikaj ŝtatoj povu tion fari, kondiĉe, ke la interŝanĝproporcioj restu je la antaŭkonflikta situacio. Sed samtempe ĉiuj ŝtatoj riproĉis la komercadon kun la kontraŭuloj pere de siaj propagandaj servoj. Ripetiĝis la klaĉoj, ke la svisoj estas profitantoj, kiuj riĉiĝas dum alies militoj.

A.- Sed diplomatie estas agnoskite, ke la svisa federacia registaro pravas en sia strebado konservi al la ekonomiaj interŝanĝoj la ekvilibron, kiun ĝi havis antaŭ la koncerna konflikto. Svislando ne agas neŭtrale, se pro iu ajn kaŭzo ĝi favoras unu el la konfliktantoj. La aliaj konfliktantoj tuj proklamas, ke Svislando ĉesis esti neŭtrala lando.

Cl.- Tiuj kelkaj klarigoj eble komprenigis al niaj geaŭdantoj, kiom kompleksa estas la svisa nocio de eksterlanda politika neŭtraleco.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras: Ĝis reaŭdo !